# Díaz-Canel rekonis la laboron de industria grupo BioCubaFarma




Havano, feb 13 (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-Canel agnoskis la laboron de la grupo de bioteknologia kaj farmacia industrioj (BioCubaFarma) kaj asertis ke la faka scio portis solvon de kompleksaj problemoj starigitaj de la Kovim-19.

Per mesa?o en Tvitero, la kuba ?tatestro anka? skribis ke “multaj scioj lernitaj dum la batalo kontra? la kronviruso ekstari?as en sferoj kiel nutra suvereneco”.

Dum kunsido de la jara bilanco de la industria grupo, la prezidento elstarigis la maturecon atingitan de la bioteknologia  grupo en tiu ?i kompleksa epoko de pandemio kaj taksis ties agadplanon por la venontaj jaroj tre integrala kaj realisma.

Inter la plej elstaraj rezultoj de la jaro menciindas la fabrikado de produktoj apartenantaj al la proceduroj aplikataj fronte al la Kovim-19 kiel Jusvinza, Nasalferon kaj Biomodulino T, inter aliaj.

Anka? la prototipoj de pulm-ventoliloj de altnivelaj servoj, la diagnoziloj por mezuri la antigenon de la viruso Sars-cov-2, la kreado de aliaj produktoj por uzado en la testoj de PCR kaj la kvar vakcinaj kandidatoj kubaj: Soberana 01, Soberana 02, Mambisa kaj Abdala.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/247589-diaz-canel-rekonis-la-laboron-de-industria-grupo-biocubafarma

Radio Habana Cuba